# EKO 2025

**Nord-Nederlande**

EKO 2025-39, Okt 5  Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Sen alkroĉaĵo Sume 540 KB

## Parko kun reklamstando – ni semas kaj semas konstante

Septembre oni oficiale malfermis la novan Sudam parkon en Groningen (Norda Nederlando).. Dum multaj jaroj jam ekzistas strato kiu nomiĝas Esperanto. La nova parko estas proksime de tiu strato. La komunumo nun elektis por du projektoj ankaŭ la nomon Esperanto. Nun estas nova Esperanto-tunelo kaj nova Esperanto-pado. La pado estas ĉefe por piedirantoj kaj biciklistoj. Bedaŭrinde mankas ĝis nun la nomŝildoj!




Dum la posttagmezo multaj homoj pasis nian budon. Estis facile ekparoli kun la preterpasantoj. Ni atentigis la homojn ke ili promenas en la Esperanto-pado. Sed tuj poste ni demandis: ĉu vi scias kio estas Esperanto? Foje pozitiva respondo kaj ni klarigis kion nia grupo faras. Se iu havis neniun ideon, ni klarigis la celon de Esperanto kaj ĝia facileco. Johan, Andries kaj mi donis informojn! Multajn foliojn ni disdonis kaj atentigis la homojn pri niaj studosemajnfinoj. Oni povis pere de QR-kodo aliri pliajn informojn.

Ineke Emmelkamp

## Instruista trejnado en Burundo

Mi dankas vin pro viaj subtenoj al ĉi tiu trejnado de trejnistoj en Burundo. Vi ne povas imagi la sukceson, kiun ĝi havis rilate al la penetrado de Esperanto en la publikajn lernejojn de Burundo. Jen la agada raporto pri la trejnado de instruistoj en Esperanto por instruistoj en la publikaj lernejoj de Burundo. La trejnado bone iris, kaj fine ni havis la honoron bonvenigi la konsiliston de la ministro respondecan pri partnerecoj, kiu reprezentis la ministron. Vi vidos filmetojn de lia parolado, sed ĉi tiu estas en la franca.

https://drive.google.com/file/d/16iUIsMTaqz6efajWv98Zqla5Tdwz7hp_/view?usp=drive_link
https://drive.google.com/file/d/1_qfLG4D4KbcGNykrujAkcHrUE8zjwJ7k/view?usp=sharing
Dosiero kun fotoj: https://drive.google.c

Aime Patrick Manakiza

## Lingvo-regado en la fokuso

La konkurson "La plej bona reganto de Esperanto en 2025" en la KER-ekzameno kadre de la 110-a UK en Brno gajnis S. Alexandra Sato el Usono. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2025/09/konkurso-52/ kaj gratulu ŝin kaj la aliajn premiitojn en la konkurso.

## Lingvafest’ daŭre populara – ankaŭ en Slovakio

Permesu al mi mallonge informi vin pri la sukcesa lingva festivalo "LingvaFest´2025", kiu okazis la 11-an kaj 12-an de septembro 2025 en la Universitato de Ekonomio en Bratislavo sub auspicio de Peter Pellegrini, la prezidento de Slovakio https://www.lingvafest.sk/eo/. La festivalo reokazis post ses malhelaj jaroj (pandamio kaj profunda geopolitika krizo en EU/Eŭropo kaj la mondo) kun pli ol 3000 partoprenantoj. La organizantoj estis esperantistoj, <Edukado@Interreto> kaj Slovakia Esperanto-Federacio kunlabore kun ;a Universitato de Ekonomio Bratislavo kaj ĉefoganizanto, Reprezentejo de Eŭropa Komisiono en Slovakio kaj kunlaboris kun ni ankaŭ pliaj institucioj.

Ni esperantistoj kunlaboras jam pli ol 20 jarojn kun neesperantistaj, neregistaraj organizoj, kun kiuj ni dividas similajn vidpunktojn kaj valorojn. Ili fariĝis niaj partneroj, aliancanoj, kun kiuj ni kunorganizas komunajn eventojn kaj efektivigas projektojn. En tiu ĉi kazo tio estas lingvoj, plurlingveco kaj kompreneble paco en EU kaj Eŭropo.

Ni jam nun pripensas organizadon de du  LingvaFestoj en ĉiu jaro en Slovakio. La duan LingvaFest ni volus organizi en la orienta urbo Košice (la 2-a plej granda urbo en Slovakio) okaze de la Tago de gepatra lingvo (21-a de februaro). Ni jam trovis tre kapablan poligloton (pli ol 10 lingvoj) kaj organizanton, neesperantiston, kiu estas malfermita kaj vidas, ke Esperanto plene funkcias ankaŭ kiel laborlingvo. Li helpis organizi la ĉi-jaran *LingvaFest* kaj havis du interesajn prelegojn.

## Bateri-elektraj trajnoj por Wellington

La France bazita kompanio Alstom liveros al Nov-Zelando la unuajn bateri-ekipitajn trajnojn por la antaŭurba trafilko de la ĉefurbo, Wellington. Alstom ricevis sumon de $US 634m por la mendo de 18 trajn-kompletoj, kune kun kontrakto por prizorgi ilin.

## Junulare katalune antaŭ-aŭtune, oportune

La 82-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (IJK-82) okazos de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026 en la urbeto Tiana (Katalunio), tre proksime al Barcelono.  Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2025/09/ijk-35/

## Teozofio kaj teo-sopiro

Mi tre ĝojas atentigi vin pri freŝa artikolo en **uea.facila**:

**“Teo: la plej amata trinkaĵo de la mondo”**

Aŭtoro: *Myrtis Smith.*  Eblas ankaŭ aŭskulti la artikolon, voĉlegitan de *Miko Sloper*
Ĉu vi jam gustumis vian tason da teo hodiaŭ? La artikolo rakontas pri la longa historio de tiu trinkaĵo, ĝia disvastiĝo tra la mondo, la diversaj specoj de aŭtentika teo kaj ankaŭ

pri aliaj popularaj infuzaĵoj. Legu aŭ aŭskultu ĝin ĉi tie:
[uea.facila – Teo: la plej amata trinkaĵo de la mondo]

Mi esperas, ke vi ĝuos la legaĵon – eble kun varma taso da teo enmane!

## Brazila muziko



Ĉi tiu estas unu el la plej konataj cirandoj (tipa regiona muzikstilo de brazila nordoriento) de nia lando, titolita Al mi donis Lia. Ĝia originala titolo estas *Quem me deu foi Lia*, kaj la tradukon faris **Cícero Soares**:

Kaj jen video de la kanto Liĝja (originale *Lígia*), verkita de **Tom Jobim** kaj tradukita de **Vitor Mendes**. Krom Jobim mem, registris tiun kanton Chico Buarque, Gal Costa, João Gilberto kaj multaj aliaj artistoj el pluraj landoj:

## Forpasis Dmitry Cibulevskij

La 17-an de septembro 2025 forpasis Dmitrij Miĥajloviĉ Cibulevskij (1946-2025), konata sovetunia kaj ukrainia inĝeniero, instruisto kaj esperantisto, aŭtoro de kelkaj libroj en Esperanto. Legu nekrologon en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto:* https://sezonoj.ru/2025/09/cibulevskij/

## Pri la Infana Kongreseto en Ĉeĥio

“Mi partoprenis en la Internacia Infana Kongreseto (IIK) en Brno kaj mi ĝin tre ĝuis. Estis tie Gitta kaj Tammy el Germanio, Desmond el Pollando, mia fratino Cecilia kaj mi (el Ĉeĥio). Foje aldoniĝis ankaŭ aliaj infanoj kaj adoleskuloj. Tammy kaj Gitta mi jam konis el REF (Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj). La partoprenantoj aĝis inter 6- kaj 12-jarojn kaj ni ĉiuj interkompreniĝis per Esperanto (preskaŭ ĉiuj estis denaskaj parolantoj). Dum niaj gepatroj partoprenis en la UK, ni havis propran programon kun nia gvidantino Monika, instruistino el Ĉeĥio. Kvankam ni havis rezervitan ĉambron en la kongresejo, ni pasigis multan tempon ekster ĝi. Tio ebligis oftajn renkontiĝojn kun la aliaj kongresanoj, ekzemple kiam ni ludis en la herbejoj de la universitato aŭ manĝis en la komuna manĝejo. Ni vizitis la scienc-centron Vida kaj eksperimentis tie pri koloroj kaj fajroj. Alitage en arbaro ekster Brno ni vidis sovaĝajn porkojn, konstruis „bunkrojn“, kaj el branĉoj kaj musko ni tie kreis verdan stelon kaj skribaĵon „Esperanto“.. Tuttaga ekskurso merkrede celis la digolagon de Brno, sur kiu ni veturis per ŝipo ĝis la kastelo Veveří. En la kongresejo ni ornamis la trotuarojn per kretaj desegnaĵoj, vidataj de ĉiuj pasantoj. Ni multe kreis ankaŭ en nia ĉambro: bildojn, flagojn, origamion, bestojn el balonetoj, Esperantajn objektojn el modlopasto ktp.

Rozaria Blahušová (9-jara) Fonto: L:a oktobra revuo Esperanto

## La komitataj diskutoj kaj decidoj

Jen la a protokolo de la Ĝenerala Kunveno en Brno-Burno

Ĝi estas en la komitata teko (https://uea.org/teko/komitato) kaj enhavas:

- la decidojn faritajn dum la 3 burnaj komitataj kunsidoj;
- grandan parton de la tieaj diskutoj;
- la rekomendojn;
- la liston de partoprenantoj.

Koran dankon al la protokolintoj: Erik Nemes, Adjévi Adjé, KuboF Hromoslav, Jukka Pietiläinen. Koran dankon ankaŭ al la reviziintoj, aparte Adjévi Adjé, Albert Stalin Garrido, Martin Schäffer kaj Fernando Maia Jr.

Aleks Kadar, **Universala Esperanto-Asocio (UEA) |** Ĝenerala Sekretario

Provu jenan ligilon: https://www.eo.slikom.eu/2025-09-bdk.zip

## Premio Andrea Camilleri – por novaj verkistoj

**Jen la gajnintoj de la unua eldono 2025**

Sabaton la 20-an de septembro 2025 ĉeTeatro Quirino "Vittorio Gasmann" en Romo okazis la premiad-**ceremonio** de la gajnintoj de la **unua eldono de Premio Andrea Camilleri Novaj Verkistoj**. La gajnintoj de la unua eldono estas: por la kategorio **radiodramo Adriano Saleri** kaj **Mario Migliucci** por la sekcio “chiù picca di sissanta” [por tiuj kiuj astas malpli ol 60-jaroj] per “Tuo per sempre” [Via porchiame]
Gratulojn al Mario, kiu ankau pluverkas ankaŭ por Esperanto-publiko

MichelaLipari

## Oktobraj memoraĵoj

Antaŭ 170 jaroj, la 3-an de oktobro 1855, naskiĝis Louis de Beaufront, 1855-1935), franca instruisto, esperantisto kaj idisto, nomita “la dua patro de Esperanto” pro la sukcesa disvastigado de Esperanto. Legu la liston de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por oktobro 2025 (dek nomoj), kompilitan de Aleksander Korĵenkov, en *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/10/oktobro-11/ (kaj ne forgesu sendi gratulon al Ulrich Brandenburg, kiu 75-jariĝos la 12-an de oktobro).

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Tridek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.